

**Feste
vestitaj
albanaj knaboj
bonvenigas someron**

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI

JUNIO 2002

N-ro 2 (101)

Pri la lingv'ajo
kaj ortografio¹ de



Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vort'radikojn. Ili estas alir'eblaj ĉe Interreto, en la hejm'paĝo de Juna Amiko: <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko(-) trov'igas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri, arte-far'ita ...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'igi ... Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto re-venas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperant-isto, patrino...) ni ne uzas kromsignon.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo.



Sur la titol'paĝo:
Albanaj knaboj
en tradiciaj
naciaj
kostumoj

Esperanto kiel vera solvo

Mi ver'sajne ne eraras dir'ante, ke Esperanto estas la plej klara en-korp'igo de plur'mil'jara deziro de la hom'aro kompreni sin reciproke.

La lingvo, kiu igis nin homoj kaj kiu kunigis nin en komun'umojn, sam'tempe dis-igis nin de aliaj, "fremdaj" homoj, al ni grandparte similaj. La plej okul'frapa disting'ilo montr'igas la malsam'eco de la lingvoj. Plejparte la sameco de la lingvo donis, poste, la bazon¹ de la naciaj ŝtatoj.

Unue, sur komenca ŝtupo de la evoluo la malsameco ne estis granda obstaklo², sed en la 21-a jar'cento, kiam miliardoj da homoj povas facile inter-kontakti, la tradicia vojo pli kaj pli ĝenas, ĉar la etnaj naciaj lingvoj estas por ali'lingv'anoj kiel okulvitroj por fremdaj homoj, ili vid'igas ĉion tra ali'naciaj kulturoj, kutimoj kaj intereso. Pensu pri tio, kial najbaraj popoloj ne povas uzi saman lerno-libron pri historio, ekzemple.

Sole neŭtrala³ arte-far'ita (kaj krome facila!) lingvo povas bone servi la homaron. Ĝi estas la lingvo, en kiun ĉiu nacio egale povas en-porti sian kulturon kaj kiu estas vere kompromis'ema⁴, ĉar ĝia esenco mem kuŝas en reciproka kompren'emo.

Geza Kurucz
redaktoro

1. tio, sur kio konstru'igas la tuta cetera parto / 2. bar'ajo / 3. sen-distinge egala al ĉiu / 4. kompromisi: reciproke cedi.



TUTMONDA FABEL'KONKURSO

invitas infanojn verki en Esperanto

Pääatalo-Instituto en Norda Finnlando jam la *trian fojon* invitas infanojn tra la tuta mondo, kiuj parolas aŭ nun studas Esperanton, verki fabelojn. *Pri la antaŭaj premiitaj verkoj kaj verk'intoj vidu niajn numerojn 4/2000 (95), 4/2001 (99).*

En la konkurso estas tri kategorioj:

- A** – por infanoj, kiuj aĝas malpli ol 10 jarojn;
- B** – por infanoj 10-11-jaraj;
- C** – por 12-14-jar'uloj.

La konkurs'ajoj povas esti verk'itaj de *individuoj* aŭ *grupoj* (lern-ejaj klasoj, ekzemple). Ili estos taks'itaj *aparte*. La long'eco de la konkursaĵoj ne estas fiks'ita. La ĵurio aprezas la fabel'econ kaj original'econ de la verkoj. En la skrib'ado aŭ tajp'ado de la konkursaĵo plenkresk'ulo povas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interes'igu pri la uz'ado de la lern'ata lingvo kaj ekzercu sian kre'ivon.

La konkursaĵoj atingu la organiz'anton plej laste

la 20-an de septembro 2002. Adresu ilin al:

Pääatalo-Instituto, PL 39, FI-93401 TAIVALKOSKI, Finnlando

Sur la koverto skribu la vorton "*Fabelkonkurso*" Sur la konkurs-ajo uzu *kaŝ'nomon* (individuo en unu-nombro, grupo en multenombro). La vera nomo kun preciza adreso kaj naskiĝ'dato (se eblas kun telefonnumero aŭ ret'adreso) troviĝu en aparta ferm'ita koverto.

Pliajn informojn oni povas ricevi de

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando.

Rete: *aini.vaaraniemi@pp.inet.fi*

Karaj kolegoj, sciigu pri la ebl'eco kaj helpu konkurs-em'ulojn, se necesas.



En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, el-stara islanda poeto, **Baldur RAGNARSSON**. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

17 Ferenc Szilágyi²

Malmultaj Esperanto-verk'istoj tiom plene dediĉis sian vivon al mult'flanka kaj rezulto-dona laboro por Esperanto kiel *Ferenc Szilágyi*. Li estis homo de multaj talentoj.³

Ferenc Szilágyi nask'iĝis en 1895 en Budapeŝto. La jun-aĝaj jaroj estis malfacilaj, liaj gepatroj estis mal-riĉaj, sed li, tamen, povis fini siajn lernejojn. Post la gimnazio⁴ "*sekvis zorgoj: kie prenu / gepatroj monon por la fil'*", li diras en sia plej kon'ata poemo *Viv'raporto*. Liaj gepatroj tamen iel sukcesis sub-teni sian filon kaj la *Tago* venis:

Ĝi venis: mi al patra dom'

fiere iris kun diplom'

li diras en la sama poemo. Szilágyi diplom'iĝis kiel doktoro pri juro⁵, sed la malfaciloj ne ĉesis, kaj dum jaroj li estis plej-parte sen-labora, kiel miloj da hun-

garaj intelekt'uloj⁶ dum la jaroj inter la du mond'militoj.

BILDOJ EL LA HISTORIO

Szilágyi lernis Esperanton en 1924 kaj tuj komencis fervore⁷ labori en la Esperanto-mov'ado. En 1932 kaj poste li instruis Esperanton en Svedio, en dekoj da sukcesaj kursoj, kaj faris multajn prelegojn⁸. Tiu agado preparis por li la vojon al definitiva⁹ en-loĝ'iĝo en Svedio ekde 1938. Li far'iĝis sveda civitano¹⁰, sed liaj ligoj kun la gepatra lando kaj ĝia kulturo tamen daŭre estis fortaj.

Kiel originala verkisto Szilágyi estas plej konata kiel novel'isto¹¹. Li tamen verkis ankaŭ poemojn, sed ili nen-

iam aperis en aparta poem'libro. En 1929 li aper'igis volumon de siaj tradukoj de poemoj de 53 hungaraj poetoj, kaj en 1934 kelkaj liaj originalaj¹² poemoj aperis en la kolekto *Dekdu poetoj*.

La unua originala novel'aro de Szilágyi, *Trans la Fabeloceanon*, aperis en 1931. Ĝi havas la sub-titolon *Modernaj fabeloj*, ĉar la aŭtoro ne sekvas for-

ĉio-sci'ulo, kiu pretendas²⁰ la rajton kritiki kaj ordoni. Liaj verkoj estas real'ismaj kaj ofte pri-traktas konkretajn²¹ kaj psikajn²² problemojn.

En 1958 aperis lia sola romano, *Mistero Minora*. Ĝi estas verk'ita en la unua persono, la mi-persono, kies pensojn la aŭtoro intime²³ konas. La mi-persono, *Marteno Bíró*, sur-

LITERATURO DE LA ESPERANTA

mulojn¹³ karakterizajn al tradiciaj fabeloj, sed provas modernigi¹⁴ la inklinojn¹⁵ de siaj fabelaj kre'it'ajoj. Tiu metodo¹⁶ montras tendencon¹⁷ al milda ironio, kiu ĉiam poste estas konstat'eblo kiel ia sub-tono en la originalaj proz-verkoj de Szilágyi.

Tri pliaj kolektoj de noveloj sekvis en la post-militaj jaroj: *La granda aventuro* (1945), *Inter sudo kaj nordo* (1950) kaj *Koko krias jam* (1955). Ili montras lian daŭran progreson kiel verkisto. Plej not'indas la humanismo de la aŭtoro, Szilágyi estas, unua-vice, etika¹⁸ verkisto, tamen li neniam pozas¹⁹ kiel

prenas la rolon de detektivo²⁴, kiu klopodas mal-kovri imag'itan krimon koncerne sian antaŭan amat'inon, kiu lin for-lasis, sed tiu krimo fakte ne reale okazis, la "mistero"²⁵ estas "minora"²⁶, mal-granda, triviala²⁷: alia viro akiris la virinon.

En 1955 Szilágyi fondis la kultur'revuon *Norda prisemo*, kies ĉefredaktoro li estis ĝis sia morto en 1967. Tiu revuo tuj fariĝis la plej el-stara literatura revuo en Esperanto. La ĉefredaktor'econ baldaŭ transprenis *William Auld* kaj la revuo ankoraŭ daŭris kvin jarojn, ĝis 1972. Provo ĝin re-viv'igi en 1974

ne sukcesis. Kiel ĉefredaktoro de *Norda Prismo* Ferenc Szilágyi floris kiel publicisto²⁸, kaj oni povas rigardi ĉi tiun lastan periodon²⁹ de lia vivo kiel kro-

non de lia mult'varia kaj sukcesa laboro de unu el la plej energie optimismaj aktiv'uloj sur la kam-
po de Esperanto kaj ĝia kul-
turo.

1. oficiala skrib'aĵo pri la lasta volo de la mort'anto / 2. Ferenc Siladji / 3. atent'indaj kapabloj / 4. speco de mez'lemejo / 5. scienco pri juĝ'aferoj / 6. mal-fizikaj labor'uloj / 7. kun arda kaj kora pen'ado / 8. kler'igajn parol'adojn / 9. ne plu ŝanĝ'ebla; fiks'ita / 10. plen'rajt'ulo / 11. rakonto-verk'isto / 12. ne-pren'itaj de iu/io alia / 13. precizajn dir'formojn / 14. moderna: nun-tempa / 15. emojn / 16. cel'taŭga ag'maniero / 17. daŭran emon al io / 18. bon'kondata / 19. al-prenas ne-kutiman ten'iĝon / 20. laŭ-rajte postulas / 21. efektive ekzist'anta / 22. ne-fizikajn; anim'rilatajn / 23. kor'amike / 24. kaŝ'polic'isto / 25. enigma sekreto / 26. malpli granda / 27. mal-delikat'aĉa / 28. gazet'verk'isto / 29. tempo-daŭron.

Ludmila Jeusejeva

ĈU MI KREDU?


*Ĉu mi kredu aŭ ne kredu,
Al najbara knabo Mik,
Ke la plej mal-diligenta
Estas, en arbar', formik'¹?*

*Ĉu mi kredu, ke for-glutis⁴
Eta muso, dum tag'manĝ',
Du vir'katojn, tri kat'inojn
Krom pan'eroj kaj fromaĝ'?*

*Ĉu mi kredu aŭ ne kredu –
Lupo² fuĝis de lepor',
Ke pro timo hurlas³ lupo
De maten' ĝis nokta hor'?*

*Ŝajnas al mi, estas tio
El-pens'aj', galimatio⁵!*

1, diligenta nigra insekto, kiu vivas en granda aro en la tero / 2. sovaĝ'besto simila al hundo / 3. blek'egas / 4. gluti: tra-gorĝ'igi / 5. sen-senc'aĵo, mal-saĝ'aĵo.





Niaj instruistoj diris...

(Daŭr'igo de trafikaj saĝ'um'aĵoj el nia antaŭa n-ro, p. 7)

- Mi rimarkis, ke vi vere tre mal-rapide komprenas kaj, kontraŭe, tre rapide forgesas.
- La diferencon inter la vortoj *tempo* kaj *eterno* mi povas klar'igi ekzemple tiel: Se mi havus tempon por ĉion detale klarigi al vi, iuj el vi bezonus eternon por ĉion tion kompreni.
- Mi ne vidas ĉe vi diferencon inter hejmaj taskoj kaj lernejoj taskoj. Vi ja ĉion skribas en la lernejo.
- Ne ekzistas pli kaj mal-pli grandaj duonoj. Sed la pli granda duono el vi tion certe ne komprenas.
- Joĉjo, en via klaso ekzistas tuta regimento¹ da stult'uloj², sed vi havas la honoron esti ilia generalo³.
- Kiu nenion scias, almenaŭ ripetu tion.
- Vi estas ekster-ordinare talenta⁴. Vi sci'povas per nur kelkaj frazoj diri eksterordinare multajn stult'aĵojn.

Kolektis: Dieter BERNDT, Germanio

1. granda aro da soldatoj / 2. stulta: mal-saĝa / 3. regiment'estro / 4. grand'kapabla.

Cit'aĵoj de SARANATH el Hindio

- Libroj signifas nenion, krom se oni mal-fermas ilin. Koroj estas similaj.
- Ni havas du orelojn kaj nur unu langon, por ke ni aŭskultu pli kaj parolu malpli.

Sinjoro paŝas al la ĝiceto¹ de biletejo en staciĝdomo.

Bob: Bonan tagon! Ĉu ĉi tie oni vendas biletojn?

Bil: Jes, certe, sinjoro. Rigardu la ŝildon²: "Biletoj". Kien vi volas iri?

Bob: Hejmen.

Bil: Jes..., hejmen. Pli precize, mi petas. Kie estas via hejmo?

Bob: Kie? Nu, najbare de la parko kun la naĝejo kaj sport'halo³, malantaŭ la meblo-fabriko⁴, inter ...

Bil: Sen-dube bela kvartalo⁵. Sed malpli precize, mi petas. En kiu urbo vi loĝas?

Bob: Flusurbo.

Bil: Flusurbo. Bone. Ĉu en la unua klaso aŭ dua klaso?

Bob: En la dua, mi petas.

Bil: Ĉu en vagono por fum'antoj aŭ nefumantoj?

Bob: Por nefumantoj, mi petas.

Bil: Ĉu kun fenestra aŭ koridora⁶ sid'loko?

Bob: Kun fenestro, mi petas.

Bil: Ĉu vi petas unu-direktan aŭ revenan bileton?

Bob: Revenan, mi petas.

Bil: Bone. Dekdu dolarojn⁷ kaj kvindek, bon'volu.

Bob: Kio? Ĉu tiom multe-kosta? Mi havas nur dek dolarojn kun mi. Kiam mi venis, mi pagis nur ses dolarojn kaj dudek kvin.

Bil: La duonon.

Bob: Precize la duonon. Tiom alta ne estas inflacio⁸!

Bil: Klare! Sed tiu-kaze, sinjoro, vi evidente aĉetis unudirektan bileton.

Bob: Kaj precize tian mi volas aĉeti nun.

Bil: Ho, pardonu, sinjoro. Mi miskomprenis vin. Mi kredis, ke vi volis aĉeti revenbileton.

Bob: Jes, mi volas aĉeti revenbileton.

Bil: Do, la prezo estas la duoblo: dekdu dolaroj kvindek.

Stefan MacGill

RE- VEN BILETO

Bob: Sed ne, mi ja volas veturi nur unudirekte.

Bil: Pardonu, sinjoro, mi vere ne komprenas. Kion vi deziras precize..., unudirektan aŭ dudirektan bileton?

Bob: Unudirektan.

Bil: Do, la prezo estas la duono: ses dolaroj dudek kvin.

Bob: Bon'ege. Tiom mi povas pagi. Sed, ĉu ĝi ja estas reven-bileto?

Bil: Ne! Kompreneble ne.

Bob: Do, tio ne taŭgas por mi. Mi nepre volas revenbileton.

Bil: Sinjoro, ne stult'umu⁹! Ne diru stultajojn! Ĉu vi volas unudirektan bileton aŭ revenbileton?

Bob: Ambaŭ!

Bil: Kion?!

Bob: Ambaŭ! Mi volas unudirektan revenbileton!

Bil: Sed... sed...

Bob: Mi volas reveni unudirekte!

Bil: Sinjoro, vi mokas min.

Bob: Male. Mi vokas vin. Vendu al mi unudirektan revenbileton!

Bil: Vi diras absurd'aĵon¹⁰. La du estas reciproke ekskluzivaj¹¹!


Bob: Kaj postuli de ili duoblan prezon! (*Ekkrias.*) Tiel la fer'vojo gajnas sian monon! Tial la popolo estas malriĉa!

Bil: Gard'istoj! Bonvolu for-porti ĉi tiun sinjoron. Mi devas servi al seriozaj klientoj.

Bob: Seriozaj? Seriozaj!!!???

Bil (*krias*): Jes, seriozaj!

Bob: Nun vi krias al mi! Tion mi ne toleras! Oni kriis al mi en poŝt'ofic'ejo, oni koleris pri mi en la banko, oni insultis min en la vendejoj, oni el-jetis min el la muzeo. Nun, vi ĉi tie en la stacidomo, krias kaj insultas min!



Bob: Eks... Eks-klu-poke reciklivaĵ? Ne konfuzu min per ĵargono¹²! Vendu al mi bileton!

Bil: Mi ne povas vendi al vi bileton.

Bob: Ĉu ne povas? Kial ne? Rigardu la ŝildon "Biletoj".

Bil: Sinjoro, bonvolu elekti! Aĉetu unudirektan bileton aŭ revenbileton, unu aŭ la alian. Bonvolu for-iri de mia giĉeto kaj revenu, kiam vi decidis. Mi devas vendi biletojn al aliaj klientoj¹³.

Terura urbo! Mi volas reveni hejmen! Nur tion mi volas. Ĉu vi ne povas kompreni tion?

Bil: Vi volas reveni hejmen. Ĉu nur tion?

Bob: Jes, reveni hejmen, kaj neniam plu viziti ĉi tiun teruran malafablan urbon.

Bil: Reveni hejmen...

Bob: Tial mi petis revenbileton!

Bil *donas bileton al Bob.*

1. malgranda fenestro en pordo aŭ muro / 2. tabuŝeton kun anonco / 3. halo: ĉambr'ego / 4. meblo-far'ejo / 5. urbo-parto / 6. koridoro: tra-ir'ejo / 7. dolaro: mon'unuo / 8. pli-alt'iĝo de la prezoj / 9. kondutu mal-saĝe / 10. absurda: kontraŭa al la saĝo / 11. ne-akcept'eblaj pro kontraŭ-eco / 12. lingv'aĵo kompren'ata ne por ĉiuj / 13. pli-malpli kutimaj aĉet'antoj.

Eble estas por vi interesa la suba tabelo, kiun mi ricevis antaŭ kelka tempo de *K.Rodrigue ADOKPE*, 13-jara lernanto en Togolando.

MIA TAG'ORDO DE LUNDO ĜIS VENDREDO

| | Mateno | Posttag'mezo | Vespero |
|--------------------------------------|---|---|--|
| En labor'tagoj de lundo ĝis vendredo | <p><i>De la 5a ĝis la 6a horo kaj 30 min.</i></p> <p>Matenaj laboroj kaj sin-preparo por iri al la lernejo</p> <p><i>De la 7a ĝis la 12a:</i></p> <p>Kurs'horoj en la lernejo</p> | <p><i>De la 12a 30 min.:</i></p> <p>Tag'manĝo</p> <p><i>De la 13a 30 min.:</i></p> <p>Dorm'eto kaj sinpreparo al la lernejo</p> | <p><i>De la 15a ĝis la 17a kaj 30 min.:</i></p> <p>Lunde: Matematika leciono kaj sporto; <i>marde:</i> lern'ado; <i>merkrede:</i> grupa lernado; <i>ĵaŭde:</i> laboroj en la kampoj de instruistoj; <i>vendrede:</i> Esperanto-leciono</p> |

SABATO KAJ DIMANĈO

| Tagoj | Mateno | Posttagmezo | Vespero |
|---------|--|---|--|
| SABATO | <p><i>De la 5a:</i></p> <p>Matenaj laboroj kaj lav'ado</p> <p><i>De la 10a:</i></p> <p>memoraj ludoj</p> <p><i>De la 11a kaj 30:</i></p> <p>Sinpreparo</p> | <p><i>De la 12a kaj 30:</i></p> <p>Dormeto</p> <p><i>De la 14a horo:</i></p> <p>Plezuraj leg'ajoj</p> | <p><i>De la 15a ĝis la 17a kaj 30 min.:</i></p> <p>Lernado</p> |
| DIMANĈO | <p><i>De la 5a ĝis la 8a:</i></p> <p>Sporto</p> <p><i>De la 9a ĝis la 12a:</i></p> <p>Promen'ado</p> | <p><i>De la 12a horo:</i></p> <p>Tagmanĝo</p> <p><i>De la 13a kaj 30:</i></p> <p>Dormeto</p> | <p><i>De la 15a ĝis la 17a kaj 30 min.:</i></p> <p>Esperanto</p> |

NOKTAJ PROGRAMOJ EN ĈIUJ TAGOJ

De la 19a horo kaj 30 minutoj ĝis la 22a horo: Kelkaj ekzercoj.

Kiel respondi?

A (turnas sin al B kaj diras): Mi estas «mi», vi estas «vi». Respondu, kiu el ni estas pli mal-saĝa, ĉu vi aŭ mi?

Se la demand'ito respondas:

B: Vi.

A: Mi memor'igas vin, ke «vi» estas vi.

Se li / ŝi respondas:

B: Mi.

A: Jes ja, ankaŭ mi tion opinias.

(Ni mal-kaŝas al vi la solan eliron. Respondu jene: "Tiu, kiu metis la demandon.")

Infana humuro el Hungario de la 19-a jar'cento

A: IU KAJ NENIU loĝas en la sama domo. Foje, Neniu el-iris ĉasi birdojn kaj lu iris ĉasi sovaĝ'bestojn. Demando: Kiu restis hejme?

Respondo/a:

B: Neniu.

A: Ne, ja ni scias, ke Neniu eliris ĉasi birdojn.

Respondo/b:

B: lu.

A: Ne, lu iris, ja, ĉasi sovaĝ'bestojn.

Respondo/c:

B: Mi ne scias.

A: Hejme restis Kaj. Ili loĝis tri-ope: lu, Kaj, Neniu.



Joĉjo iris foir'ejon. Li renkontis tri najbarojn. Ili portis kun si sakojn. En tri sakoj po tri kat'idoj. Kalkulu! Kiom-opo iris foir'ejon?

(Solvo: Joĉjo iris tien sola. La aliajn li renkontis.)

Elizabeta RAJTMÁR



Fantoma¹ aŭtomobilo

Estis nokto, nov'luna mallumo. Sinjoro pied'iris laŭ la ĉefvojo. Li devis marŝi ankoraŭ du mejlojn². Liaj kruroj doloris. Li petis la helpon de aŭtomobiloj, kiuj preter-pasis lin, sed vane. Post tri aŭ kvar sensukcesaj provoj, fine, unu haltis apud li. Li en-iris kaj dankis la help'inton. Estis nenia respondo. Alia aŭtomobilo venis kontraŭ li kaj per sia reflektoro³ lumigis la aŭtomobilon. La sinjoro flanken-rigardis kaj, je lia hororo⁴, trovis, ke neniuj sidas ĉe la stir'ilo⁵!!! La aŭtomobilo ne havas stir'anton!

Eĉ ĉirkaŭ-rigardi iĝis timiga por li, ĉar al-proksimiĝas tomb'ejo... Tuj, li saltis el

la aŭtomobilo kaj rull'iĝis suben. Kiam li ek-staris kaj senpolv'iĝis siajn vestojn, li vidis sinjoron enir'onta la aŭton. Li alkuris kaj avertis la sinjoron: "Ne eniru! Ĝi estas fantoma aŭto! Ĝi iras sen vetur'ig'isto!!!"

La enironta sinjoro rigardis lin de la kapo ĝis la piedoj kaj diris: "Kion vi diras? La aŭtomobilo estas la mia. Kaj ĉar ĝi difekt'iĝis, jam antaŭ duon'horo, mi estis ĝin puŝ'anta. Mi lac'iĝis kaj haltis momente."

Dir'inte tion, la sinjoro ek-saltis en ĝin.

S-ino SARANATH, Hindio

1. fantomo: vid'ebla aŭ nevidebla mort'into, kiu re-aperas / 2. mejlo: mezur'unuo de longo; ĉirkaŭ 1,5 kilometroj / 3. lum'jet'ilo / 4. tim'ego / 5. stiri: konduki vetur'ilon.



Ĉu vi instigas viajn lernantojn okupiĝi pri liriko? Sciu, ke neniu alia intereso-sfero tiom efike elformas delikatan sentemon kaj komprenemon. Krome, la liriko per si mem konvinke pravas pri interligo de enhavo kaj formo.

Post tiom da atentovekaj vortoj ni daŭrigu la komencitan serion pri retorikaj figuroj (kp. *Juna Amiko*, n-ro 4/2001, p. 19):

Ĉu dediĉi poemeton al atestimata sinjorino aŭ sinjoro? Elpensu strofon, kies versoj komenciĝas per la sinsekvaj literoj de la propra aŭ kompleta nomo de la "prikantenda" persono! Tiel vi kreas **akrostikon**. Vidu, kiel ekzemplon, akrostikon dediĉitan al la fama E-instruisto Andreo CSEH [Ĉe]:

Atestimata Esperantisto,
 Nomkonata en la rond',
 Disdonis vi kun persisto
 Rimedon al la mond'.
 Esperanto, gvidmotivo,
 Omaĝe por la tuthomar',
 Celo por feliĉa vivo
 Signo de la am', fratar'.
 Estu vi, sepdekjarulo,
 Honorata, kun gratulo!

(El *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh*)

Eble vi kiel versokreanto volas kaŝi vian veran nomon. Transformu ĝin pere de aliaranĝo de la literoj. Tiamaniere vi ricevas **anagramon**. Atentu pri la belsoneco de la pseŭdonimo, por ke ĝi estu akceptita kvazaŭ kiel vera nomo!

- Malantaŭ la anagramo *Gamzefon* sin kaŝas la kreinto de nia lingvo (sono *h* en la nomo de Zamenhof estas anstataŭigita per *g* laŭ la rusa elparolo);
- La konata tradukisto Dalibor Bronzoviĉ ŝanĝis sian nomon en *Bo Zoroviĉ*;
- Tre belsonan anagramon por si mem kreis la rusa E-verkisto Nikolaj Borisov: li publikigis siajn verkojn sub la pseŭdo-

nimo-anagramo *Ilarij of Robis*.

Oni povas insiste atentigi pri iu natura fenomeno, kiu allogas niajn okulojn aŭ orelojn, nian palp- aŭ eĉ flarsenton.

Elektu vortojn kun la samaj komencaj sonoj, kiuj povas elvoki certan imagon de la perenda impresoj (fajfado de vento, murmurado de marondo, ktp)! Tiel vi ricevas **aliteracion**.

Tre talente tiajn tropojn konstruis Kálmán Kalocsay [Kalman Kaloĉai]:

Vokas voĉ' de Väinemöinen,
 Vibras vok' en vaga vento
 Kaj ĝin muĝas malproksimaj
 Montoj, maroj murmurantaj.

(El *Esperanta antologio Poemoj 1887-1957*)

Jen ekzemplo de **aliteracio** el *Ploro* de Baldur Ragnarsson:

La vojaĝanto ĝemas sub la rokoj,
 ratoj rodas radikojn,
 kaj la larmoŭfluo
 figuras misterojn
 sur verdaj fonoj
 kaj varma karno.

(El *Mi vizitis mian farmon*, 1987, p.122)

La efiko de la aliteracio estas des pli forta, ju pli malofte ĝi estas aplikata ene de la lirikaĵo.

Ĉu vi bone memoras la jam pli frue priparolitajn retorikajn figurojn? Jen modesta helpo:

anaforo – vortgrupoj ripetiĝas komence de sinsekvaj frazoj;

anastrofo – nekutima vortordo;

kiasmo – "vi kaj mi / mi kaj vi"

onomatopeo – "bum-bum", "tik-tik"

paranomazio – "abeloj-belaj"

polisindeto – kaj... kaj... kaj...

Ĝis baldaŭ kun novaj retorikaj figuroj:

Grenbal Dulitl el Regnamio

Ni, esperantistoj konscias, ke ekzistas en la mondo granda aro da diversaj lingvoj. Sed, ĉu vi pensis pri tio, ke krom la parola kaj skriba lingvoj, oni uzas ankaŭ gestan¹ lingvon kiu, je la unua rigardo, ŝajnas universala². Mi aludas³ pri tio, ke ali'lingvanoj ofte sukcesas kompren'igi sin per gestoj.

Malgraŭ tio ne unu-foje ankaŭ la gesta lingvo kaŭzas konfuzon; pensu, ekzemple, pri jes'ado kaj ne'ado per kap'movoj en Bulgario kaj Japanio.

Nun, dank' al la helpo de pluraj dekoj da esperantistoj el diversaj landoj, mi prezentas al vi, kiel oni kalkulas / nombras per fingroj en la mondo. Atentu ilin kaj, se mankas via kalkul'maniero, informu nin, mi petas.

Kalkulmaniero A



(1 - malfermita dikfingro, 2 - kiel 1 + malfermita montra fingro, 3 - kiel 2 + malfermita meza fingro, 4 - kiel 3 + malfermita ringa fingro, 5 - ĉiuj fingroj estas malfermitaj)

Tiel nombras britoj, finnoj, germanoj, hungaroj, togolandanoj, israelanoj...

Kalkulmaniero B



(1 - fermita etfingro, 2 - kiel 1 + fermita ringa fingro, 3 - kiel 2 + fermita meza fingro, 4 - kiel 3 + fermita montra fingro, 5 - ĉiuj fingroj estas fermitaj)

Tiel oni nombras, ekzemple, en Azerbajĝano, Rusio, Salvadoro.

Kalkulmaniero C



(1 - malfermita montra fingro, 2 - kiel 1 + malfermita meza fingro, 3 - kiel 2 + malfermita ringa fingro, 4 - kiel 3 + malfermita etfingro, 5 - kiel 4 + malfermita dikfingro)

Tiel montras la nombrojn bulgaroj, honduranoj, irlandanoj, kolombianoj.

Kalkulmaniero Ĉ



(1 - fermita dikfingro, 2 - kiel 1 + fermita montra fingro, 3 - kiel 2 + fermita meza fingro, 4 - kiel 3 + fermita ringa fingro, 5 - kiel 4 + fermita etfingro)

Tiel oni nombras en Koreio, ekzemple.



327 x 412

KALKULADO PER FINGROJ

| | A | B | C | Ĉ | D | E | F |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | |

Ni ripete petas vin, kara leganto, sendi al ni kritikajn rimarkojn pri nia revuo, pri ĝiaj artikoloj, rubrikoj. Viaj rimarkoj aperos en nia nova rubriko:

VOĈO DE LEGANTOJ

(La adreson de la redaktoro vi trovas sur paĝo 27)

Kalkulmaniero D



(1 - malfermita etfingro, 2 - kiel 1 + malfermita ringa fingro, 3 - kiel 2 + malfermita meza fingro, 4 - kiel 3 + malfermita montra fingro, 5 - ĉiuj fingroj estas malfermitaj)

Tiel oni nombras en Salvadoro, ekzemple.

Kalkulmaniero E



(1 - malfermita dikfingro, 2 - kiel 1 + malfermita montra fingro, 3 - kiel 2 + malfermita meza fingro, 4 - malfermitaj montra, meza, ringa kaj etfingroj, sed la dikfingro estas fermita, 5 - ĉiuj fingroj estas malfermitaj)

Tiel nombras slovenoj, ekzemple.

Kalkulmaniero F



(Ĉiuj fingroj estas malfermitaj kaj la montra fingro de la alia mano sinsekve saltas de fingro al fingro komencante de la etfingro)

Tiel oni nombras en Kubo, ekzemple.

De 6 ĝis 10 oni kalkulas per la alia mano en sinsekvo kiel de 1 ĝis 5.

Mi havas nur unu escepton, nome en Aŭstralio, kie de 6 oni kalkulas per la montra fingro de la alia mano (vidu kalkulmanieron F).

Geza Kurucz

1. gesto: korpo-movo por kompren'igi ion / 2. valida tra la tuta mondo / 3. atent'igas.

Esprimo de emocioj en Interreto

Kiel vi scias, estas tre mal-facile trans-igi emociojn¹ en leteroj al amiko. Se vi sci'povas pentri aŭ desegni vi povas, eble, bild'igi viajn emoci-ojn: rozon, lipojn, sunon... Aŭ al-glui desegn'ajon. Bedaŭr-inde, per la klav-aro² de komput'ilo, fari tion ne eblas.



Ĉu ne estas eble...? Tra-rigardu nur malgrandan el-ĉerp-ajon de la sekva "vort'aro".

(Por ricevi la sencon, vi devas nur turni la dikajn tajp'ajojn je 90 gradoj laŭ la iro de horloĝaj montr'iloj.)

Diversaj hom'tipoj:

- :-{ lip'har'ulo
- :-{} ino kun ŝmink'itaj³ lipoj
- :'-(plor'anto
- <|-) ĉino
- *:-) klaŭno⁴
- :o) klaŭno
- C=:-) ĉef'kuir'isto
- @:-) arabo
- O:-) anĝelo⁵
- [:-) homo kun aŭskult'iloj
- :-) mir'ig'ita ulo
- :-))) tre mirigita ulo
- :-Q fum'anto

Rid'manieroj:

- :-) simpla rid'mieno
- ;-) rido kun palpebr'umo⁶

- :--8 rido de fraŭlino
- 8:-) rido de knabin'eto
- :-{} tiu de lip'har'ulo
- {:-) tiu de peruk'ulo⁷
- :-) tiu de panko⁸
- C=:-) rido de ĉef'kuir'isto
- >:-) rido de diablo⁹


Aliaj emocioj:

- :-(mal-gaja
- :-| indiferenta¹⁰
- |-| dorm'anta
- |-O osced'anta¹¹
- :-D kri'anta
- :-X buŝo ŝlos'ita (fid'inda)
- :-9 lek'anta lipojn (bon'gusta)
- :-*) ebria
- :-| skeptika¹²

1. profundajn sentojn / 2. prem'butonoj de komputilo / 3. ŝminki: kolor'igi vizaĝon / 4. gaj'ig'isto / 5. ano de la ĉiellando / 6. palpebro: kovr'ilo de okulo / 7. peruko: nevera har'aro / 8. jun'ulo kun moderna har'aranĝo / 9. loĝ'anto de malo de ĉiellando / 10. hav'anta intereson pri nenio / 11. el-igi aeron el la plumoj tra larĝe malferm'ita buŝo; signo de enuo / 12. mal-kred'ema.

Kolibr'ido Zunzun

de Ernesto Padrón, *Kubo*



KVIZO KONKURSO POR VI ^{en}

Kara amiko, ne forgesu, ke vi povas ek-partopreni en nia kvizo-ludo post ioma ajn turniro. Informu viajn kon'atojn pri la ebl'eco kaj al-tiru konkurs'ontojn!

La regularon vi trovas en la antaŭa numero: n-ro 1/02 (100), marto 2002, p. 22.

Kompletajn listojn vi trovas en nia hejm'paĝo. Vizitu ĝin, ni petas:

www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto

Abon'tarifoj de Juna Amiko por la jaro 2002

| | EUR | USD | 2-4 ekz. | Ekde 5 | Aere |
|----------|---------|------|----------|---------|-------|
| Tarifo 1 | 11 | 10 | -33.3 % | -50 % | +20 % |
| Tarifo 2 | 6 | 5,60 | -33.3 % | -50 % | +20 % |
| Tarifo 3 | 4 | 3,60 | -20 % | -30 % | +20 % |
| Hungario | 600 HUF | | 480 HUF | 420 HUF | — |

SOLVOJ

DE N-RO 1/02 (marto 2002)

La Unua Etaĝo (paĝo 17)

Rozalinda prenis la vortojn de ĉiu sin-sekva frazo en kresk'anta nombro:

Nia (1) reĝo (2) estas (3) tre (4) bonkora (5).

RINGA ENIGMO (paĝo 22)

1. kafo; 2. oleo; 3. eksa; 4. baso; 5. abio; 6. kuzo; 7. truo; 8. truo; 9. balo; 10. abel'

Kvizo-konkurso (n-ro 1/02, paĝo 21)

Vi trovas la ĝustajn solvojn sur la apuda paĝo.

**PARTOPRENU EN NIAJ KONKURSOJ!
SOLVU NIAJN ENIGMOJN!**

La plej lertaj solv'intoj de la marta numero (Redaktis ĝin legantoj mem el pluraj landoj)

1-a kategorio:

*Anna Milkovic, HR 23 p.
Monika Milkovic, HR 23 p.
Kirsi Tauriainen, FI: 21 p.*

2-a kategorio:

*Samanta Čajic, HR 26 p.
Marina Milkovic, HR 26 p.
Ugljesa Rusmar, HR 26 p.*

3-a kategorio:

*Ecaterina Popoviciu, RO 30 p.
Pavol Petrik, SK 27 p.
Lenĉe Efremova, MK: 26,5 p.
Svijetlana Akik, HR 26 p.
Maria Molnár, HU 26 p.
Martina Odabašic, HR 25 p.*

- 1 Korektu la erarojn (atentu, temas pri paronimoj¹): (4 poentoj)
Avo rakontas al siaj nevo: "En mia jun'aĝo gejunuloj ne somer'umis ĉe la mano, sed naĝis en la apuda lako."
- 2 Kreu almenaŭ naŭ vortojn per la radiko *mar-*. (3 poentoj)
- 3 Finu la proverbon: "*Amiko de amiko,*" (3 poentoj)
- 4 Klar'igu la mallong'igojn: *ekz. ; k.a. ; p.K.* (3 poentoj)
- 5 Trovu po du sinonimojn² por la sekvaj vortoj: (4 poentoj)
lerni, detru, signo, tuj
- 6 List'igu almenaŭ naŭ florojn. (3 poentoj)
- 7 Vi deziras uzi Pasportan servon. Kion fari por akiri gast'ig'anton? (3 poentoj)
- 8 Menciu almenaŭ tri E-lingvajn muzikajn kompaktdiskojn. (3 poentoj)
- 9 Listigu almenaŭ du Nobel'premiitojn, kies beletraj verkoj aperis en Esperanto. (2 poentoj)
- 10 De *marko* venu al *benko*. (!) (2 poentoj)

La solvojn sendu al: *Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio*
Ret'adreso: *mbelosev@public.srce.hr*

1. preskaŭ sam'sonaj vortoj / 2. vortoj kun la sama aŭ tre simila senco.

Solvoj de la lasta numero (n-ro 1) de 2002

1. En septembro de la jaro 1973, en Hungario.
2. *En la lingvoj rusa, pola, franca kaj germana.*
3. En ĉiuj tri okazis jam Universalaj E-Kongresoj kaj ĉiuj tri urboj elsendas radioprogramon en Esperanto.
4. *Ĉar ĝi havas kolegon (!).*
5. gazeto, koverto, respubliko
6. En Sovetunio (1925).
7. senhavulo, senpiedulo, senmanulo, sennomulo, senhejmulo, senlaborulo, senbarbulo, senharulo, sendankulo, sencerbulo...
8. lup'ago : lu'pago
9. persono
10. *Ne helpas spegulo al malbelulo.*
11. Naŭ.

| | | | | | | | | | |
|---------------------------|---|----------|----------|----------|---|----------|----------|----------|----------|
| A | U | N | U | A | E | T | A | Ĝ | O |
| L | Rubriko por la plej et-aĝaj esperantistoj | | | | Verk'ita de Stefan MacGill kaj liaj filinoj Karina kaj Hajnal | | | | |
| stefan.macgill@galamb.net | | | | | | | | | |



*E-ter'prognozo*¹

Judita havas sam'aĝan amikinin, Katerinan, kiu loĝas en apuda loĝejo. Estas dimanĉa mateno kaj Judita invitis ŝin al si. Katerina al-venas kaj sonor'igas ĉe la pordo.

J: Saluton! En-venu kaj rigardu mian komput'ilon!

K: Ĉu ĝi en-havas ludojn?

J: Jes, sed nun mi ne ludas. Mi mesaĝas en babil'ejo.

K: Babilejo? Kio estas tio?

J: Babilejo estas ejo – loko –, kie oni povas babil'adi kun aliaj personoj ĉirkaŭ la mondo.

K: Ĉu ili povas aŭdi vin?

J: Jes. Mi havas mikrofonon. Jen ĝi. Mia parolo iras al la aliaj, kaj ili aŭskultas min.

K: Kaj kio aŭd'igas?

J: Laŭt'parol'ilo. Rigardu, jen mia laŭt'parolilo. Post momento, ni aŭdos ilin.

K: Kiujn ni aŭdos?

J: Nun en la babilejo estas Nils el Svedio, kun kiu mi ofte babilas; Ĵang el Ĉinio. Ankaŭ li estas kon'ato. Karen el Usono. Ŝi estas nov'ulo por mi. Kaj Trevoro el Nov-Zelando. Hodiaŭ ili babilas nur pri la vetero. (*Judita ŝaltas² la laŭt'parolilon.*)

Karen (*nur voĉe*): ... ĉe ni brilas la suno, sed estas malvarme. Estas nur 34 gradoj.

Nils (*nur voĉe*): 34 gradoj ĉe vi, en Usono egalas al 2 gradoj³ ĉe ni. Ja malvarme!

J (*ŝaltas la mikrofonon*): Saluton, Judita re-venis al la babilado. Mi en-lasis mian najbar'inon, Katerinan.

K: Saluton Nils, ...Ĵang, ...Karen kaj ... kaj ...tiu en Aŭstralio.

Trevoro (*nur voĉe*): ... en Nov-Zelando. Mi estas Trevoro. Kia estas la vetero en Budapeŝto?

J: Mi ne scias. Ĉe ni estas mateno, mi ne el-iris ankoraŭ.

K: Nek mi. Ni loĝas en granda mult'loĝeja domo en la mezo de la urbo. Niaj loĝejoj frontas⁴ al la interna korto. Ni apenaŭ vidas la sunon kaj ĉielon.

Trevoro: Mateno ĉe vi. Vi post-restas! Ĉe ni estas jam vespero.

Karen: Kaj ĉe ni estas preskaŭ nokto-mezo. Noktomezo de via hieraŭo.

J: Ĉu vi rajtas resti ekster la lito ĝis noktomezo?

Karen: Ne. Mi estas en mia lit'ĉambro kaj en pijamo⁵. Miaj gepatroj opinias, ke mi dormas! Sed mi povas diri al vi la veteron en Budapeŝto!

Trevoro: Ho, kiel? Ĉu vi estas magiisto⁶? Ĉu vi povas vidi naŭ horojn en la est'ont'econ!?

Karen: Ne. En mia lit'ĉambro mi havas propran televid'ilon; mi ŝaltis ĝin al la veter'kanalo⁷.

J: Ĉu vi havas apartan kanalon por la vetero!?

Karen: Jes. Mi havas pli ol sepdek kanalojn. Ĝuste nun ĝi montras Eŭropon. Mi vidas satelitan⁸ bildon de la nuboj super Eŭropo. El la urba listo mi legas... Budapeŝto: 62 gradoj...

Nils: 62... tio estas 16 gradoj por ni.

Karen: Kun suna vetero, kun nur malmultaj nuboj. Milda vento el la sudo.

J: Bon'ege, dankon! Mi diros al Paĉjo kaj Panjo, ke indas viziti la besto-ĝardenon, laŭ nia plano.

K: Kaj pro la miraklo⁹ de komputiloj, satelitoj kaj la Interreto, ni jam scias kiel vesti nin! (*La grupo plu babilas pri aliaj temoj.*)

Diskutu, respondu:

Hodiaŭ la babil'antoj diskutas nur pri la vetero. Kiujn aliajn temojn ili povos poste diskuti? Pri kio vi babilus, se Judita invitus vin al komputilo? Ĉu vi havas komputilon? Ĉu kun ludoj? Ĉu kun mikrofono kaj laŭtparolilo? Se ne, ĉu vi ŝatus havi tian? Kun geknaboj el kiuj landoj vi ŝatus babili?

1. prognozo: antaŭ-diro; E – elektronika / 2. funkciigas aparaton / 3. la diferenco venas de tiu inter Farenhejtaj kaj Celsiusaj gradoj / 4. turnas la antaŭan parton al / 5. nokto-vesto / 6. homo kun super-natura forto / 7. ŝalt'vojo al iu programo / 8. satelito: ĉiel'korpo, kiu rond'iras planedon / 9. mir'inda afero.

ŜERCO

ŜERCO

de Hajnal
MACGILL



Ankoraŭ ni restas sur la planedo¹ Pluturno, kie la stult'uloj² el Stulturo³ vivas kaj bone fartas, krom la sekv'antaj:

Malsan'ulo vizitas kurac'iston.

Malsanulo: *Kiam preni tiun medikamenton⁴?*

Kuracisto: *Unu horon antaŭ la doloro.*

Du stulturanoj staras en la urbo-centro. Ili volas iri al la urbo-rando.

“Ĉu ni iru buse aŭ piede?”

“Egale. Ni elektu tiun, kiu venas la unua.”

Homo staras apud granda griz'ajo en tomb'ejo kaj forte plor'egas. Venas stultulo

kaj demandas al la plor'anto:

“Kial vi ploras?”

“La elefanto mortis. Terure, la elefanto mortis. Tragedio, katastrofo! Bu-hu-hu...”

“Ho, klare, vi tre amis la elefanton!”

“Tute ne. Mi eĉ ne konas ĝin.”

“Kial vi, do, ploras?”

“Mi laboras kiel tomb'isto kaj mi devos fosi ĝian tombon!”

Al stultur'ano kun vund'ita mano demandas kuracisto:

“Kio okazis al via mano?”

“Hundo mordis ĝin.”

“Ĉu vi sen-infektigis⁵ ĝin?”

“Ne, ĉar ĝi forkuris.”

1. ĉiel'korpo
- kiel nia Tero /
2. mal-saĝ'uloj
- / 3. lando en
- Ptuturno / 4.
- kurac'ilon / 5.
- infekti: malsan-
- igi per mikroboj.

Panjo kantas lul'kanton al infano vespere en la lito. Inter du strofoj, la infano demandas:

“Panjo, kion vi deziras, ĉu plue kanti, aŭ ke mi en-dorm'igu?”

Karina MACGILL

Estas 250 specioj da ŝarkoj, el tiuj nur 30 estas danĝeraj por homoj. La plej granda estas la balenŝarko, ĝis 20 metrojn longa, sed ne-danĝera. Ĝi manĝas planktonon kaj etajn bestetojn.

Ŝarkojn allogas sango, kiun ili sentas jam de granda distanco; ili rapidas al la vund'ita fiŝo. La ŝarko mem estas malvarm'sanga besto.

Ĝis sep metrojn longa. Ĝi havas sep vicojn da dentoj. La blanka ŝarko estas la plej kon'ata kaj la plej danĝera por homoj

Delfenoj en grupoj povas ataki ŝarkojn. Ili batas siajn bekojn kontraŭ la spir'iloj (brankoj) de la ŝarko. Pro tio la ŝarko iom post iom mortas.

Ŝarkoj manĝas plej multe dum nokto. Ĝi manĝas kiun ajn fiŝon, kiun ĝi atingas – eĉ aliajn ŝarkojn; ili ne timas ataki baleenojn. Ili manĝas eĉ ne-digesteblajn...

...aĵojn – lignopecojn, ladskatolojn.



ĈIO INTERESA PRI ŜARKOJ

Laŭ multaj homoj, la plej bela estas la blua ŝarko, kiu povas esti



KIEL HELPI BLIND'ULON?

(Fundamentaj konoj)



POR ORIENTI ▶

◀ **UNUE AL-PAROLU.** (Aŭd'inte vian voĉon la blindulo ek-scias pri vi kaj via situo.)



Klar'igu konkrete, ekzemple: "Iru 50 metrojn rekte kaj vi trovos ĝin en via dekstra flanko." Ne diru: "En tiu direkto." Tio helpas nenion.



ĈE ŜTUP'ARO ▶

◀ **POR AKOMPANE GVIDI** lasu al la blindulo leĝere teni vian brakon aŭ ŝultron.



Voĉe anoncu: "Ni iros supren / malsupren." Tio helpas multe.



POR SCIIGI PRI LA SITUO DE OBJEKTOJ ▶

◀ **POR MONTRI SID'LOKON** faru, ke la blindulo tuŝu la dorson de la seĝo.



Montru la situojn, kvazaŭ ili estus sur horloĝo. Ekzemple: "La kuko estas je la tria horo." (Ne diru: "Tie.")



Ilustris: Satiko SAWA
Japana Asocio de Blinduloj

◀ **KIAM VI FOR-IRAS** nepre anoncu voĉe, alie la blindulo parolus al vi ne sci'anta pri via for-esto.



◀ **POR TRANS-DONI MONON**
Transdonu monbiletojn kaj mon'erojn unu post la alia voĉe kalkul'ante ilin.

Kiel oni vivis antaŭ 6000 jaroj en nordaj pinglo-arbaroj? Tion montras ŝtonepoka vilaĝo, rekonstru'ita sur lago-bordo en Saarijärvi, Finnlando.

Proksim'ig'ante al la vilaĝo, oni pied'iras laŭ mallarĝa vojo, kie ĉiu paŝo egalas 15 jarojn re-

stru'elementojn oni kun-metis helpe de ledaj rimenoj² kaj lignaj juntoj³, sen gluo⁴. Alte, ĉe la supro oni vidas sledon⁵, per kiu la ŝtonepokaj ĉas'istoj vintre veturis sur la glacio, kiam ili serĉis fokojn⁶. La kapt'itan fokon ili vetur'igis hejmen per sledo.



Meze de la loĝejo brulas fajro, la fumo el-iras tra truo en la supro. Apud la fajro sidas homo en ledaj vestaĵoj kaj kuiras. Ŝi havas ne metalajn kaserolojn, sed argilajn potojn, kiuj staras ne sur, sed en la sabla planko.

VIVO en la ŝton'epoko


tro, en la pas'int'econ. Tabuloj sur la voj'rando rakontas, kio okazis antaŭ cent, kvincent, mil, dumil aŭ dekmil jarojn antaŭe.

Ni al-venas al la bordo de la lago. Infanoj sen-ŝu'igas sin, sur-metas ledajn vestojn kaj aŭskultas rakonton pri la pasinta viv'maniero. Ili en-iras rondan loĝ'ejon, far'itan el junaj sen-branĉaj arboj, betul'ŝelo¹ kaj ledo. Nenie estas vid'eblaj najloj, metalaj hokoj aŭ ŝraŭboj. La kon-

En unu malpli granda loĝejo oni aŭdas ŝamanon⁷ kanti sian magian sorĉ'kanton. Ankaŭ tie la fumo kirl'ig'as⁸ supren al la ĉielo kaj griz'igas la internon de la ovala kabano, duone sink-inta⁹ en la teron.

Sur la muroj oni vidas dentegojn de bestoj kaj sekig'itajn kuracajn plantojn. (La kanto de la ŝamano estas originala surbend'igo el Siberio.)

1. betulo: arbo de norda ter'zono kun blanka trunko-ŝelo / 2. bendoj el ledo / 3. kun-igaj partoj / 4. duon'likva aĵo, kiu kunigas du objektojn / 5. glit'vetur'ilon / 6. foko: speco de mara mam'besto / 7. ĉio-sci'ulon de mal-moderna hom'grupo / 8. kirl'i: ronde movi likv'aĵon / 9. mal-rapide mal-supren-igi.



Mo

M estas la deksepa litero de la alfabeto.

Maljuna Marteno manĝis multajn migdalojn.

Jen nova Esperanto-ABC, el-don'ita de Eldon'ejo Esperanto. Ĝi en-havas rakont'etojn pri bestoj kaj infanoj de la tuta mondo – krome etajn facilajn kantojn. Ĝi precipe celas de-nask'ulojn. Ĉiu unu-opa litero ricevis bildon kaj frazon. Informojn petu de *Norvega Esperant'ista Ligo (NEL)* ĉe: nel@esperanto.no

Morice Benin

en esperanto

Nova kompakt'disko de

Vinilkosmo

Esperanto-Muzik-Prod.
FR-31450 Donneville, Francio

Ret'adreso:

vinilkosmo@esperanto.org
eurokka@club-internet.fr

<http://www.vinilkosmo.com>



KONTAKTO

La pli aĝa frato de
JUNA AMIKO.

Du-monata internacia
revuo de Tut'monda Esperant-
ista Junulara Organizo (TEJO) kun interesa
tem'aro el la tuta mondo. Triono de la artikoloj
estas verk'ita en facila Esperanto. Vizitu ĝian TTT-ejon:
<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>

Tri afganaj rifuĝ'intoj, lernantoj de la projekto *LINGVO DE PACO* kiu okazas en Irano, serĉas kontaktojn per Esperanto.

Bon'volu kuraĝ'igi ilin, send'ante simplan bild'karton, eĉ se vi ne deziras ade korespondi kun ili. Jen iliaj adresoj:

F-ino Moĝĝan VANTANPUR (20-jara), Tabage 3, Buluk-e 2, Shahrak-e Seyd ol Shohada, Kh: Babai, Yaft Abad, Tehran, Iran

S-ro Esmail VAKILI (15-jara), NO:4, K:4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Esfahani, Punak, Tehran, Iran

S-ino Malihe VAKILI (21-jara). Vidu la antaŭan adreson!

juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

29-a jaro, n-ro 2 (101), 2002

Aperas 4 fojojn jare

Redaktoro: **Géza KURUCZ** (Hitel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario)

Retadreso: suli267@szeged.sulinet.hu

Vicedaktoro: **Stefan MacGill** (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)

Varba direktanto: **Zoran Ćirić**, *Branka Miljkovica 14, YU-18000 Niš, Jugoslavio*

Administranto: **Sándor Hideg**. Retadreso: juna.amiko.adm@posta.net

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: **Baldur RAGNARSSON** (Islando)

Kunlaborantoj: *s-ino Raita Pyhälä, Anja Karkainen* (Finnlando), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Zoran Ćirić* (Jugoslavio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Gennadij Basov* (Rusio), *Bardhyl Selimi Mezi* (Albanio), *Till Dahlenburg, Dieter Berndt* (Germanio), *Pekim Tenorio Vaz, Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah B.Attiogbe-Agbemadon* (Togolando), *José J.Campos Pacheco* (Kubo).

Grafikistoj: *Irina Nagy* (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio)

Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Ĉinojn u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1318

EN LA NATURO



monto

sciuro

herb'ejo

birb'ido

tendo

ponto

arbo

hamako

dorso sak

nesto

arbusto

ripoz'lito

hok'bastono

voj'eto

lag'eto

herbo

vulpo

boato

floroj

2/02